Wilhelm Busch,

Abenteuer eines Junggesellen

Die Sache wird bedenklich

Sokrates, der alte Greis,
Sagte oft in tiefen Sorgen:
"Ach, wie viel ist doch verborgen,
Was man immer noch nicht weiß."
Und so ist es. – Doch indessen
Darf man eines nicht vergessen:
Eines weiß man doch hienieden,
Nämlich, wenn man unzufrieden. –
Dies ist auch Tobias Knopp,
Und er ärgert sich darob.
Seine zwei Kanarienvögel
Die sind immer froh und kregel,
Während ihn so manches quält,
Weil es ihm bis dato fehlt.
Ja, die Zeit entfliehet schnell;
Knopp, du bist noch Junggesell! –
Zwar für Stiefel, Bett, Kaffee
Sorgt die gute Dorothee;
Und auch, wenn er dann und wann
Etwas nicht alleine kann,
Ist sie gleich darauf bedacht,
Daß sie es zurechte macht.
Doch ihm fehlt Zufriedenheit. –
Nur mit großer Traurigkeit
Bleibt er vor dem Spiegel stehn,
Um sein Bildnis zu besehn.
Vornerum ist alles blank;
Aber hinten, gottseidank,
Denkt er sich mit frohem Hoffen,
Wird noch manches angetroffen.
Oh, wie ist der Schreck so groß!
Hinten ist erst recht nichts los;
Und auch hier tritt ohne Frage
Nur der pure Kopf zutage. –

. . .

Wilhelm Busch,

Aventuroj de fraŭlo

tradukita de Karl Vanselow

La ĉagreno

Jam Sokrates en maljuna aĝo,
Fama pro filozofia saĝo,
Ofte diris kun ĉagrena sento:
Multon en la mondo ni ne konas
Kaj ĉi tiu scio-manko donas
Kaŭzon por plendinda malkontento.
Jes, ĉi tion oni certe scias.
Same pense staras nun Tobias
Knopp, la fraŭlo, antaŭ la spegulo.
Kial estas li senedzinulo?
Ĉiam gaja estas la vizaĝo
De la birdo-viro en la kaĝo.
Certe nur pro tio, ĉar lin ravas,
Ke li ĉarman bird-edzinon havas.
Kun envio diras Knopp al si:
Do edzinon serĉu ankaŭ vi.
La fidela Dorote'
Ĉiam estas preta, se
Servo iu ajn necesas,
Kaj neniam ŝi forgesas
Zorgi por la lito, por la ŝuoj,
Por la kafo kaj manĝaĵaj ĝuoj.
Ankaŭ kun kudrilo kaj fadeno
Estas preta ŝi por helpa veno.
Tamen ne forlasas lin la sento
De malĝojo kaj de malkontento.
Sur la antaŭa parto de l' kranio
Ne trovas haron eĉ la fantazio,
Kaj ankaŭ de la dorsa kapo-flanko
Lin alradias pleno-luna blanko..
Jes, en la spegulo de spegulo
La haro-nombro estas nura nulo.
Sed ne nur la brila kapo-blanko
Estas kaŭzo por kontento-manko.

. . .

Auch bemerkt er außerdem,
Was ihm gar nicht recht bequem,
Daß er um des Leibes Mitten
Längst die Wölbung überschritten,
Welche für den Speiseschlauch,
Bei natürlichem Gebrauch,
Wie zum Trinken, so zum Essen,
Festgesetzt und abgemessen. –
Doch es bietet die Natur
Hierfür eine sanfte Kur.
Draußen, wo die Blumen sprießen,
Karrelsbader Salz genießen
Und melodisch sich bewegen,
Ist ein rechter Himmelssegen;
Und es steigert noch die Lust,
Wenn man immer sagt: du mußt.
Knopp, der sich dazu entschlossen,
Wandelt treu und unverdrossen.
Manchmal bleibt er sinnend stehn,
Manchmal kann ihn keiner sehn.
Aber bald so geht er wieder
Treubeflissen auf und nieder. –
Dieses treibt er vierzehn Tage;
Darnach steigt er auf die Waage,
Und da wird es freudig kund:
Heißa, minus zwanzig Pfund!
Wieder schwinden vierzehn Tage,
Wieder sitzt er auf der Waage,
Autsch, nun ist ja offenbar
Alles wieder, wie es war.

. . .

Lin ĉagrenas ankaŭ la amplekso
De la ventro pro la tro-konvekso.
Kion fari? Kontraŭ korpo-diko
La helpiloj estas gimnastiko,
Karlsbad-salo kaj marŝad-promeno.
Ĉiutage jam en la mateno
Uzas li de ili la aplikon.
Ĉiutage li piede iras
Malgraŭ la kapricoj de l' vetero
Kelkajn horojn en la freŝ-aero
Esperante la efikon,
Kiun tiel ege li sopiras.
Ĉiam ree la kuraĝon levas
Lia diro al si mem: Vi devas.
Tiel dum semajnoj du
Li senlace agas plu.
Jen starante nun sur la pesilo
Li konstatas feliĉeg-ebrie:
Dudek funtoj pezas li malplie.
Senmezura estas la jubilo.
Du semajnoj pasas plu denove.
Ree uzas li pesilon prove.
Sed - ho ve - ho kia malplezuro!
Ĉu kredeble? Jen, la pez-mezuro
Vere nun indikas tie ĉi
Dudek funtojn jam denove pli.
Ĉiu peno estis sen utilo.
Malbenita estu la pesilo!

. . .

Ach, so denkt er, diese Welt
Hat doch viel, was nicht gefällt.
Rosen, Tanten, Basen, Nelken
Sind genötigt zu verwelken;
Ach – und endlich auch durch mich
Macht man einen dicken Strich.
Auch von mir wird man es lesen:
Knopp war da und ist gewesen.
Ach, und keine Träne fließt
Aus dem Auge, was es liest;
Keiner wird, wenn ich begraben,
Unbequemlichkeiten haben;
Keine Seele wird geniert,
Weil man keinen Kummer spürt.
Dahingegen spricht man dann:
Was geht dieser Knopp uns an?
Dies mag aber Knopp nicht leiden
Beim Gedanken, so zu scheiden
In ein unverziertes Grab,
Drückt er eine Träne ab.
Sie liegt da, wo er gesessen,
Seinem Schmerze angemessen.
Dieses ist ja fürchterlich.
Also, Knopp, vermähle dich.
Mach dich auf und sieh dich um,
Reise mal ’n bissel rum.
Sieh mal dies und sieh mal das,
Und paß auf, du findest was.
Einfach ist für seine Zwecke
Das benötigte Gepäcke;
Und die brave Dorothee
Ruft: “Herr Knopp, nanu adjeh!”

Ree kaptas lin animdoloroj.
Nun li pensas: Homoj kiel floroj
Estas destinitaj por perei.
Al la sorto devas ni obei.
Iam ankaŭ mi estinta estos,
Mia tombo sen ornamo restos,
Ĉar neniu homo resopiros
Aŭ funebre rememoros min.
Jes, neniu ploros, oni diros:
Tobbi Knopp ne interesos nin.
Parolante al si mem Tobias
Tiel plenda-kore fantazias.
Vidu, senekzempla ekzemplero
De larmego gutis al la tero
Tie, kie li sur benko sidis.
Sed kun firma volo li decidis
Al la fraŭlo stato fari finon.
Serĉi volas ankaŭ li edzinon.
Eble li konstati povos:
Kiu serĉas, tiu trovos.
Tiucele por vojaĝo
Kun espero kaj kuraĝo
Baldaŭ jam li preta estas.
Adiaŭ-dire do - ho ve -
Sola nun kaj forlasita restas
Lia bona, brava Dorote’.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Wilhelm Busch *(∗1832-04-15 – †1908-01-09).*

Arg-1053-2136 (2014-06-17 21:40:18)

Pri la verko vidu la retejon `http://www.zeno.org/Literatur/M/Bus h,+Wilhelm/Bildergeschichten/Abenteuer+e nes+Junggesellen/Die+Sache+wird+bedenklich`, *pri la verkinto la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Busch` *respektive* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_Busch`.

Traduko de la Germana poemo “Abenteuer eines Junggesellen” de Wilhelm Busch *(∗1832-04-15 – †1908-01-09) en Esperanton de* Karl Vanselow *(∗1877-03-20 – †1959-12-28).*

Arg-1053-2137 (2014-06-18 18:55:03)

Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto “Nia Lingvo Esperanto”, eldonita de Karl Vanselow. Pri tiu vidu la retejojn `http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow`, *ankaŭ:* `http://vanselow.wikispaces.com/`.